




Januaro – 2004 – N-ro 31-a
ASTURIO

ENHAVO

- 2...Nia Regiono
- 3...La Acra Polvo
- 4...Kuriozaj Demandoj
- 5...Nekonato
- 6...La Ĵusveninto (5)
- 7...La Pirogfesto
- 8...Mozaiko
- 9...Mesaĝoj
- 10.Ventoblovoj
- 11.Aviles kaj ĝia Monumentoj
- 12.Boora la Pelikano
- 13.La Krokodila Venĝo
- 14.Mia Plej Bona Amiko
- 15.Amuzaĵoj
- 16 Provervaro pri Amo



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



Sablero Morís

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolas Muñiz

Prezidanto: Cezaro García

Sekretariino: M^a Luísa Menendez

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: Císimo Rabanedo

Kasisto: Luis González

Bibliotekistino: M^a Isabel Murillo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Gene Álvarez

Tere Rodriguez

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILES Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Deposito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

**Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo**

NIA REGIONO

CARAVIA

Caravia estas malgranda astura municipo sufiĉe malkonata de geasturoj. Situantaj je la oriento de la regiono, ĝi nur havas 600 loĝantojn; siaj plej grandaj vilaĝoj estas Prado kaj Duesos. Estas en ĝi interesaj lokoj kie oni trovis tre antikvajn spurojn de homloĝado: ekzemple en Picu'l Castru. Unu el tiu spuro, fama, estas la steleo de Duesos, bele ornamita ŝtonaĵo. Caravia havas belajn monumentojn apartenantaj al diversaj epokoj: ekzemple la palaca ensemblo de la familio González Cutre, de la Renaskiĝo; la paroĥa preĝejo Santiago (Sankta Jakobo) de Caravia datiĝas de la XVII jarcento kaj estis konstruita sur antaŭa monaĥejo. Tipa rura domensamblo estas tiu de El Francu, en Suba Caravia. En Caravia naskiĝis la fama Aurelio del Llano, unu el la fondistoj de la Centro pri Asturaj Studoj; li multe skribis pri la astura folkloro. En Caravia la asturaj mitologiaj tradicioj estas ankoraŭ sufiĉe viglaj, kaj eĉ iuj el ili havas originalajn trajton: ekzemple, la "Trasgu" (astura koboldeto) emas ludi keglojn! Kvankam Caravia nur havas 4 kilometrojn da marbordo, estas imponaj klifoj kaj strandoj tie. Konatiĝu do, se plaĉe, kun la impresa sablero Morís!

La Redakcio

LA AERA POLUO

Pensu tutglobe! Agu unuloke!

Kvankam multaj homoj pensas ke la aera poluo ne difektas grave la sanon, la sciencaj reserĉoj ripetas pli ofte, ĉiutage, kiel ĝi estas tre grava kaŭzo de morto kaj malsano.

Ekzemple, ĵus publikigita dokumento (en la tre konata medicina revuo "The Lancet") farita en Aŭstrio, Francio kaj Svislando asertas ke en tiuj landoj (ne speciale poluitaj), la aera poluo kaŭzas ĉiujare 40.000 mortojn (6% el ĉiuj), 25.000 novajn astmulojn kaj duonmilionon da astmaj epizodoj.

La aŭtomobilo estas la plej grava fonto de tiuj poluaĵoj. Kaj la surŝoseaj akcidentoj estas la plej ofta mortokaŭzo inter la eŭropaj gejunuloj. Krome... kion diri pri la bruo kaj la detruado de vilaĝetoj, pejzaĝoj, arbaroj... pro aŭtovojoj?

Sed la poluo estas ankoraŭ pli granda problemo en aliaj regionoj el la mondo; fakte, en Azio, ĝi estas vera katastrofo!: Laŭ la Azia Disvolviĝa banko en tiu kontinento la aera poluo mortigas ĉiujare 500.000 personojn! Kaj pli ol kvar milionoj suferas spirajn malsanojn pro tiu kaŭzo.

Laŭ raporto de la Unuiĝintaj Nacioj, granda polua nuboj kovras la Azian Sudon, minacante la vivon de milionoj da homoj. Tiu nuboj estas produktita de arbaraj incendioj, bruligado de ne-kultivitaj terenoj, aŭtomobiloj, fabrikoj, termikaj centraloj kaj fine de milionoj da forneloj.

Tiu granda "Azia bruna nuboj" reduktas, laŭ la scienculoj, la sunan radiadon en tiu zono (ĝis la 15 %), varmigas la atmosferon, modifas la vintran musonon (la ventojn) kaj pro tiu kaŭzo, reduktas la pluvon en la nordokcidenta Azio kaj pliabundigas ĝin en la orienta marbordo, kaŭzante, tiel, inundojn aŭ sekecon. Krome, la nuboj difektas grave agrikulturon kaj produktas acidpluvon. Laŭ tiu raporto, eble ĝis du milionoj da homoj povus morti ĉiujare nur en Barato pro tiuj kaŭzoj kune.

Kaj tiuj problemoj probable kreskos dum la sekvontaj jaroj tutmonde!


Urgas radikale ŝanĝi niajn kutimojn, simpligi nian vivon, uzi malpli la aŭtomobilon, plibonigi la publikajn transportilojn, pligrandigi la produktadon de renovigeblaj energioj...

Ĉu ekzistas, vere, alia ebleco?

VACENTJN PÉREZ

kuriozaj demandoj

- 1- Se advokato freneziĝas... ĉu li perdas saĝon?
- 2- Ĉu infantoj ĝuas infanecon samkiel adoltoj ĝuas adulton?
- 3- Kion kalkulas ŝafinoj por dormi?
- 4- Kial la nigraj prunoj estas ruĝas kiam ili estas "verdaj"?
- 5- Se frostigilo troviĝas je ne pli ol 10 gradoj sub la nulo kaj sur Antarkto kutime troviĝas je 50 gradoj sub la nulo, ĉu geviroj ne povus varmiĝi enirante en la frostigilon?
- 6- Por kio ni kuras kiam pluvas se antaŭe de ni ankaŭ pluvas?
- 7- Kies arbo estas la frukto el laboro?
- 8- Kial ni levetas la ŝultrojn kiam pluvas? Ĉu ni malsekiĝas malpli?
- 9- Kiu estas la fama personulo Oni Konstruas kiu ĉiam estas barante la stratojn?
- 10- Kion oni faru se oni vidas estingiĝontan beston manĝante estingiĝontan planton?
- 11- Kiun koloron havas kamaleono rigardante sin sur la spegulo?
- 12- Kial Bill Gates nomis sian mastruman sistemon Windows (fenestroj) se li povus ĝin nomi Gates (pordoj)?
- 13- Ĝis kie kalvuloj lavas al si la vizaĝon?
- 14- Kial oni nomas nian planedon Tero se $\frac{3}{4}$ partoj de ĝi estas akvo?
- 15- Se ni konsistas el 80 % da akvo, kial ni dronas?
- 16- Ĉar Tero estas ronda kaj oni ĝin nomas planedo, ĉu se ĝi estus plana oni ĝin nomus rondedo?
- 17- Kial "disigon" oni skribu ĉion kune kaj "ĉio kune" oni skribu disige?
- 18- Kial ni premas pli forte la butonojn de la telekomandilo kiam ĝi havas malmulte da piloj?




Ludoviko

NEKONATO

La objektoj kiujn nun mi tuŝas...
kiuj tuŝos ilin morgaŭ?




Ĉi grundon kiun mi surpaŝas...
kiu ĝin surpaŝos morgaŭ?




Kion mi lasas inter muroj
kiu tion kolekti povos?
Kiu blindiĝos en la suno
transiranta miajn fenestrojn?

Ĉi kontor' pri kiu mi pensas...
kiu, ve, ĝin "pensos" morgaŭ?



Ĉu estos same akceptata
ĉi lum' de la ĉiel' donata?



La poeto estas ja spegulo,
li ne lacas pro rigardi.
Bildoj de li nun kaptataj...
kiu poste ilin rigardos?

Verkis: *Fina de Calderón* (madrida poetino)

Esperantigis: *M^a Luisa Menéndez*

LA ĴUSVENINTO (5)

Malvarmas, sur la stratoj. Estas multe da vigleco. La nova jaro hodiaŭ komencis kaj la homaro gajas kun novaj esperoj. Estas ankoraŭ spuroj de la frenezeto de gejunularo: rompitaĵoj kaj plastikaj glasoj ĉie. Tute certe ili havis feliĉan nokton. Mi decidis resti hejme, enmetita en miaj pensoj. Mi tamen ni povis eviti la bruon kaj do ne havis tro bonan dormadon. Matene mi iris en nekonatan vilaĝon, laŭ mia ĉiujara kutima ritualo. Ekkoni alian lokon estas por mi la maniero celebri tiun novecon kiun aliaj festas per diboĉado kaj malkonsciiĝo. Mia –ekde nun– vilaĝeto troviĝas surprize ne tro malproksime de nia urbo; strange ke mi ne emis antaŭe veni en ĉi tiun belan pejzaĝon”, unu pluan fojon mi pensas. Malgranda vilaĝo, sed ne tro malgranda por ke mi trovu neniun, en normalaj kondiĉoj, kompreneble. Sed ŝajne eĉ en la vilaĝetoj ili decidis prefere ĝui la nokton ol tiun klaran ensunan matenon. Miaj kunuloj, do estis birdoj kaj bovinoj, min rigardantaj mire.

Vespere denove urben. Vintro nur antaŭ iuj tagoj komencis kaj tagoj mallongas. Sed tamen oni povas aserti ke nuntempe, tagon post tagon, la noktoj ja mallongiĝos; la antaŭeniro de la vintro ne reprezentas, tial, sinko en melankolia malheleco, sed, kontraŭe, preludo de venonta vivkreanta printempo. Mi ridetis rememorante kiel ĉi tiu stranga paradokso min ĉiam mirigis ekde miaj adoleskaj jaroj.

Mi ne ŝatus montriĝi kvazaŭ grumblema soleculo malŝatanta la ĝojan ularon; laŭ mi promenas, mi ja ametas la dezirplenajn okulojn de la geinfanoj rigardante tra la montro-fenestroj tiujn ludilojn kiujn la Tri Orientaj Magoj tute certe alportos al ili –laŭ nia kultura tradicio– post nur malmultaj noktoj. Mi rememoras ankaŭ tiujn feliĉajn jarojn de infaneco. Sed mi tamen konstatas ke nia iluzio, tiam, ne tiom rilatis al la akiro de pliaj materialaj posedaĵoj kiel al la retrovo de parencoj kiujn delonge oni ne estis vidinta. Ne nur tiujn feliĉajn geinfanojn mi vidas nun. Proksime de ili, aliaj infanoj, malriĉe vestitaj, tremante kaj pere de malforta voĉo, petas humile de la preterpasantoj monhelpon por manĝi unuafoje por tiu tago.

DOKTORO AJENDANJO

LA PIROGFESTO



Dionisio de la Huerta

Je septembro de 1930, tri viroj: Dionisio de la Huerta, Benigno Fernández kaj Morán Manés, faris la unuan pirogekskurson sur la rivero Sella. Tiun tagon la pirogismo naskiĝis en Asturio.

Tiu pirogekskurso ne estis kurado, temis nur pri tri amikoj malsupreniĝante la riveron plaĉe. En 1932, la 28an de julio, estis la unua pirogkurado. La pirogistoj malsupreniĝis la riveron de Arriondas ĝis Ribadesella. Dionisio de la Huerta estis ĉagrenita ĉar li ne volis, ke la ekskurso iĝu kuradon.

Li atingis la kuradfinon kun la unua Sella-pirogistino, Marta Junquera, je la lasta loko.

En tiu unua kurado jam oni vidis la du facojn de la "Sella-kurado": ĝi estas pirogkurado kaj ĝi estas pirogifesto.

La unuan sabaton de aŭgusto ĉiujare, meztage, komencas la kurado, sed la antaŭan vesperon kaj nokton venas al Arriondes 100.000 uloj por festigi. La uloj kantadas, trinkadas, dancadas... Estas tre granda popolfesto. La Arriondes-stratoj pleniĝas je ridoj kaj muzikoj, neniu dormas.

Sabate matene, je la deka horo, la muzikfigurantoj transiras la stratojn, kaj post ili, "la tritonoj" iradas. Ili estas servoj de Neptuno, uloj maskitaj kiuj poste iros en la river-bordo.


Je la dekunua horo, ĉiuj iras en la riverbordon serĉonte lokon por vidi la pirogekirejon. La "tritonoj" iras al la rivermezo.

Meztage, oni legas la disvokon, kaj la pirogekirejo poste sonas. Komencas la pirogkurado.



Kristoforo

MOZAIKO



Meksikia civitano kiu rezultis senvunda post kvar trajnaj akcidentoj po nur du monatoj elektrokutiĝis mortige dum li ludis per la elektra trajno de sia filo.

Kia granda falo!

En 1972 jugoslavia stevardino saltis al la aero sen paraŝuto post la eksplodo de la aviadilo DC-p en kiu ŝi vojaĝis. La virino surteriĝis en Ĉeĥoslovakio post libera falo je 10.058 metroj. Ŝi postvivis.

Astrologia malspriteco


Grandnombraj asekuraj kompanioj de Britio ĵus establis tarifojn kiuj konsideras la astrologian signon.

La Virgo kondukantoj estas tiuj kiuj malpli pagas ĉar ili estas tiuj

kiuj havas malpli da akcidentoj, kaj la Kaprikornoj estas tiuj kiuj pli pagas, kaŭze de sia mallerto stirade.



VIRGO



La granda fromaĝaĵo

Estas 2000 varioj de fromaĝo en la tuta mondo. La francoj asertas ke ili havas unu po ĉiu tago de la jaro, alivorte, 365 specoj de fromaĝo.



Minante vivojn

La usona militista inteligento-servo kalkulas ke estas 100 milionoj da ne eksplodintaj kontraŭhomaj minoj dissemataj je la tuta planedo.

Daise Murillo

MESAĜOJ

La tempo forflugas tiel rapide ke denove revenis la tempo kiam nia grupo devis alfronti la organizadon de la Zamenhof-tago honore al la kreinto de la internacia lingvo. Ni festis ĝin, kiel kutime, kun la amikoj de la Astura Esperanto Asocio apartenanta al la najbara urbo Ŝiŝono (Gijón en hispana lingvo, Xixón en astura lingvo!). Ankaŭ akompanis nin du kantabraj samideanoj, el ili Miguel



Adúriz, de la Akademio de Esperanto. Ni vere ĝuis la tagon (malgraŭ la pluvado) kaj ankaŭ la loka ĵurnalaro bone kondukis kun ni reflektante ĉiujn la programerojn de la celebrado kaj eĉ intervjuante niaj voĉdonantoj tiel ke la avilesa loĝantaro daŭre informiĝu pri la avantaĝoj kaj situacio de Esperanto.

Eble iuj el nia grupo povos ĉeesti al la

12-a Internacia Esperanto Semajno

de la Kulturo kaj Turismo en "SALOU", Tarragono, Hispanio

"Sub aŭspicio de Hispana Esperanto Museo"

Hotelo San Francisco. 2 – 9 oktobro 2004

<luis_serrano@mixmail.com>

Lasta novaĵo

Ĉefpreleganto de la 12-a I E-S, s-ano **Gian Carlo Fighiera**

Nekrologio

Ni kondolencas la edzinon de nia leteramiko sinjoro Joseph Kondor, kiu forpasis dum la pasinta jaro en la germana urbo el Engers. Ni petas li ripozu pace.

Rememoru ke vi povas

kontakti nin retroŝtante ĉi tien:

esperanto@asturies.org

INTERRETO



Dum la kvar sezonoj iradas,
la vento, ĉiam petolema
blovas ĉien, laŭ sia volo,
alterne akra aŭ karesema.

Kiam printempo venas kaj ĉion renovigas
la vento ŝtelas al genistoj
ilian mielan odoron.
Poste ĝi flugas, parfumita
super la ruĝaj papavetoj...

Somere, dum la brila suno
dissemas sur maron milojn da diamantoj,
la vento lulas la velŝipojn
kaj dancigas la ondojn klarajn
laŭlonge de la sabla strando...

Per mirindaj koloroj, aŭtuno plibeligas
majestajn arbojn en la parko.
Sed la vento, ĉiam aŭdaca,
rapide senvestigas ilin,
kaj la velkaj folioj fariĝas papilioj...

Vivu la vent', vivu la vintra vent'.
Ĝi galopas tra la kamparo,
enŝoviĝas, siblante, sub la pordo ĝemanta,
poste fuĝas ĉiam pli alten
por ludi kun la blankaj nuboj...

La kvar sezonoj estas for,
finiĝas la mia poemo.
Kvazaŭ skribita en la ĉielo
ĝi estas nur vortoj... alvente!

Fernande Terral Beziers
(Langvedoko, Francio)



AVILÉS KAJ ĜIAJ MONUMENTOJ

La unuaj mencioj pri la ekzisto de la urbo devenas de la romia epoko, laŭ atesto de diversaj arekeologiaj restaĵoj, moneroj kaj ceramikaĵoj trovitaj en ĝiaj ĉirkauaĵoj.

Kvankam Avilés ŝanĝis sian fizionomion, precipe pro la t. n. industria revolucio en la provinco, meze de la pasinta jarcento, tiu urbo ankoraŭ konservas grandan nombron da monumentoj kaj mirindaĵoj kiuj provizas al la malnova kerno de la urbo specialan altiron. Jen ekzemploj:

. Placo de l' Carbayo* (elp. Karbajo), kie elstarigas belegaj popolaj domoj kaj ankaŭ la preĝejo de Sabugo, devenanta de la XIII^a jarcento.

. Preĝejo de Sankta Nikolao el Bari, interesa monumento de Mezepoko, kies romia deveno restas maskita pro la diversaj ŝanĝoj en ĝi okazintaj laŭlonge de la jaroj.

. Teatro Palacio Valdés, starigita komence de la pasinta jarcento, restaŭrita antaŭ kelkaj jaroj, kie okazas la plej gravaj kulturaj eventoj de la urbo, kiel teatraĵoj, koncertaĵoj, baletoj, k. a.

Avilés, samkiel ĉiu evoluinta urbo, havas interesajn parkojn, hotelojn, restadejojn kaj ankaŭ modernajn restoraciojn kie gustumi, interalie, la plej tradician asturan gastronomion: "fabada"-n (fazeoloj kuiritaj laŭ la astura maniero), kantabrajn marestaĵojn, ĉiaspecajn asturajn fromaĝojn, rizon kun lakto kaj aliajn manĝaĵojn.

En Avilés, ankaŭ eblas ĝui diversajn popolajn festojn tre konataj ene kaj ekstere de la urbo kaj provinco, kiel la t. n. Antroxo (elp. Antroŝu – la tri tagoj de l' Karnavalo), la festo de l' Bollo (elp. Bolju) kaj Sankta Aŭgusteno (patrono de la urbo).

Ekde Avilés vi, kara leganto, povas fari interesajn ekskursojn al diversaj urboj aŭ lokoj de la provinco: Oviedo, ĉefurbo de Asturio; Gijón, dua plena grava urbo; Cudillero (elp. Kudiljero), pitoreska urbeto de fiŝkaptistoj; montopinto Gorfolí; Prahistoria groto Arbedales aŭ Kabo Peñas.

Venu viziti Avilés-on! Ĝi tre plaĉos al vi.

* Kverko

idolo (Gijón – Asturio)

En la pratempo, Boora (pr. Bura), la pelikano, en sia glata, nigra plumaro, posedis arboŝelkanuon. Tiuepoke ĉiu pelikano estis nigra. Kvankam, efektive, li ne bezonis kanuon, ĉar li povis naĝi de loko al loko tiel facile kiel li povis pagaji, plaĉis al li scii, ke li havas ion, kion la aliaj birdoj ne posedas.

Iun tagon, post kiam pluvego inundis la landon, Boora vidis, sur kota insulo en la mezo de turbulanta rivero, viron kaj tri virinojn sidantaj sur fiksita arbŝtipo. Post multaj petegoj, Boora konsentis savi la aborigenojn. Tamen, ĉar Kantiki, la plej juna kaj plej bela, allogis lin, li sekrete planis ŝteli ŝin por si mem.

Do, la pelikano kanue transportis la aborigenojn unuope, sed li lasis Kantiki-n ĝis la lasta vico. Tamen, kiam Boora foriris kun sia tria pasaĝero, Kantiki, kiu teruriĝis pro liaj evidentaj intencoj, deprenis de siaj ŝultroj la felkovrilon. Ŝi volvis ĝin ĉirkaŭ ŝtipon, kiu havis preskaŭ la saman grandecon kiel ŝi mem, metis ĝin sur la saturitan teron kaj kviete glitis en la akvon, esperante renkonti siajn kunulojn ĉe la malproksima bordo.

Kiam Boora, arde atendanta, revenis por kapti sian premion, li tiel multe ĉagreniĝis, pro la dormado de la knabino, ke li piedfrapis la figuron tiamaniere, ke li vundegis sian piedon. Furioza, pro la perdo de Kantiki, pro la doloro en sia piedo kaj ĉar li ridindigis sin, li repagajis al sia restadejo.

Ŝpruciginte blankan kolorilon sur la kapon kaj korpon, sammaniere kiel la aborigenoj, kiam ili pretigas sin por batalo, Boora estis preta ekiri por rekapti Kantiki-n, kiam maljunaj pelikano ekvidis lian koloritan korpon. Ili tiel naŭzigis pro lia aspekto, ke ili atakis Boora-n per siaj longaj bekoj kaj forpelis lin el la ripozejo; samtempe ili dekretis, ke pelikanoj neniam ŝanĝu sian koloron.

Tamen, malgraŭ tio, tiom da junaj birdoj, kiuj enuiĝis pri sia malhela plumaro, kolorigis sin per blanka farbo, ke nuntempe ĉiuj pelikanoj, kiuj oni vidas sur la laĝetbordoj aŭ kiuj manĝas en la bilabongoj estas kolorigitaj nigre kaj blanke same kiel Boora estis antaŭ tiel longe.

Tradukita de Edna Jullie - Brisbano (kunlaborantino Jennifer R. Bishop)

LA KROKODILA VENĜO

Estis iam multaj krokodiloj loĝantaj en la rivero Samarahan. Ili estis tre amikemaj al la homoj en tiu tempo kaj ne atakis ilin. Iam, tamen, tio ŝanĝiĝis kaj tio havis tre seriozan kaŭzon.

Iun vesperon estis festo en ĉarma *kampong* (vilaĝo) proksima al la rivero Samarahan. Ĝi estis por festi la finon de la rikoltperiodo. Multaj knaboj iris al tiu festo, nomata *gendang*. Inter ili estis 7 nekonataj knaboj. La vilaĝanoj volis scii, de kie ili venis. Kiam la festo finiĝis, la 7 knaboj mistere malaperis.

Oldulo en la vilaĝo pensis, ke tiuj knaboj estis fakte krokodiloj. Li ne certis pri tio, sed li volis kontroli la certecon de siaj suspektoj. Li alvokis la loĝantojn de la najbara vilaĝo kaj sciigis al ili pri siaj suspektoj kaj ke li ellaboris planon por eltrovi de kie venis tiuj nekonatoj. Tial, do, en la najbara vilaĝo oni okazigis *gendang*-feston.

La festo komenciĝis kaj la knaboj denove aperis. La maljunulo trankvile forlasis la domon. Kelkaj vilaĝanoj iris al la montaro, ĉar kelkaj supozis, ke la knaboj venis de tiu regiono. Alia grupo direktis sin al la rivero. Nelonge poste eblis vidi, ke iuj kuras en la direkton de la rivero... Temis fakte pri la 7 knaboj!

La maljunulo kaŝita atendis. La knaboj saltis en la riveron kaj tuj transformiĝis en krokodiloj. Li povis, do, konfirmi sian suspekton.

Unu el la vilaĝanoj deziris kapti krokodilon kaj devigi tiun homiĝi. Tial li organizis plian feston kaj decidis atendi ĉe la rivero mem. Tiam li konstatis, ke 7 krokodiloj transformiĝas en 7 knaboj kaj ke ili pendigis siajn krokodilajn haŭtojn en arbobranĉo. Li ŝtelis unu el tiuj kaj iris hejmen.

Je la festofino, la knaboj reiris al la rivero, sed unu el ili ne povis eniri sian krokodilan haŭton kaj restis ĉe la bordo ploranta. Li volis reiri al la akvo kun siaj fratoj kaj vivi kiel krokodilo. La doloro scii, ke li ne povos revidi siajn fratojn estis tiom forta, ke li mortis pro tristeco.

La aliaj fratoj estis tre koleraĵoj pro tiu evento kaj decidis venĝi la morton de la frato. De tiu tago ili komencis kapti kaj manĝi homojn. Krokodiloj fariĝis danĝeraj kaj ne plu eblis al la homoj alproksimiĝi al ili.

ATILIO ORELLANA ROJAS
(argentinano en Nederlando)





Du amikoj promenis en la dezerto. Dum la ekskurso ili ekkverelis, kaj unu amiko vangofrapis la alian, kiu ofendiĝis, kaj senvorte skribis sur la sablon: “Hodiaŭ mia plej bona amiko vangofrapis min.”

Ili iris plu en la dezerto kaj atingante oazon ili banis sin. Tiu amiko, kiu estis vangofrapita neatendinte subakviĝis kaj preskaŭ dronis, sed la alia savis lin. Kiam li rekonsciigis li ĉizis en ŝtonon. “Hodiaŭ mia plej bona amiko revivigis min.”

Tiu amiko, kiu estis la vangofrapanto kaj ankaŭ la savanto demandis: “Kiam mi frapis vin, vi skribis vian opinion sur la sablon kaj nun ĝin vi ĉizis en la ŝtonon. Kial.”


La alia respondis: “Kiam iu ofendas vin, nur sur sablon licas skribi, por ke la vento de la pardono povas nuligi la vortojn. Sed se iu helpas vin, ĉizu tion en ŝtonon por ke neniu povu nuligi ĝin”

KONKLUDO: Skribu viajn ofendojn sur sablon, sed la bonfaron ĉizu en ŝtonon.

El la hungara ~~bulteno~~ **VESPERTO**

Verkis **Julianna Vas-Szegedi** – Tiszasentimre

Kunlaborantino **Katya Virginia de S. Ramos** (Brazilo)





Amuzajoj

CISIMO



"En via ago mi tre plezure studis kaj laboris..." - diras patro al lia filo. Do, kiam tiu entuziasmo de vi foriris? - Demandas filo.
Kveta kaj Jaromir - Ĉeka respubliko

ONI NE POVAS LIN TROMPI
Gabrovano aĉetis kilogramon da sukero, sed trovis en ĝi sablerojn. Li sendis al la redakcio de la loka ĵurnalo jenan anoncon: "Hieraŭ mi aĉetis sukeron, en kiu mi trovis sablerojn. Se ĝis morgaŭ la butikisto, kiu trompis min, ne alportos al mia hejmen kilogramojn da pura sukero, mi anoncos lian nomon en la Ĵurnalo".
La sekvan tagon kvin butikistoj el diversaj kvartaloj de la urbo alportis al li po du kilogramojn da sukero.

Ĉe itala edziĝ-ceremonio, la pastro demandis al la novedzino, "Ĉu vi akceptas Franco Giuseppe Antonio por esti via edzo?"

Sajne konfuzita, ŝi respondis "Mia pastra Moŝto, okazas eraro. Mi edziĝas al nur Franco".
Patricia Harkin - Australio

NE TUTE BONE

-Paĉjo, hodiaŭ mi ŝparis ses monerojn, ĉar ne eniris la aŭtobuson, sed kuris post ĝi.
-Bone, sed ne tre - respondis la patro - Vi devis kuri post taksio, tiel vi povus ŝpari pli da monojn

Edzino: Donald, kiam ni lasfoje ricevis leteron de nia filo?

Edzo: Unu momenton, karulino, mi rigardos en mia ĉeklibro.



PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
C/ La Magdalena n° 26 - 1° D

**PERFORTA AMO ESTAS
PLEJ FORTA MALAMO**

Amo kaj puno loĝas komune

Amo pli kora, disiĝo pli dolora

**AMO SUPERMEZURA
NE ESTAS PLEZURA**